



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 120 (Tenth Year) Melbourne (Melbourne), Aŭstralio. 10 Junio 1930.

ON LEARNING FRENCH.

Arnold Bennett has confessed in the London "Evening Standard," his difficulties in mastering French. Coming from a man of his intellect, with his opportunities for study, the article is of unusual importance, comments "International Language." After he had been studying the language for more than twenty-five years, and had acquired a reputation as an authority on French literature, he found he was unable to take part in conversations in France:

"He speaks French like a native."

Phrase frequently heard, but hardly ever true. More romantic lies are told about the speaking of French than about even the catching of fish. Now here is a plain tale:—I began to learn French at the age of nine. At twenty-two I put myself to some trouble and learnt to read French currently. Soon I was regarded in Fleet-street as a quite a fair minor authority on French literature. At the age of thirty-five I went to live in Paris, alone, and I discovered that I could neither understand ordinary French conversation nor make myself understood in the same. I had then been studying French for over a quarter of a century, and had been writing about French literature for over a decade. I decided that something must be done. I did it.

Most of us who have learnt French have had a similar disappointment, and have felt that "something must be done." But very few of us have been able "to do it." Even after Mr. Bennett had taken the necessary steps to become fluent, he met further disappointment:

The number of pure - blooded Englishmen who can "talk French like a native" is so small as to be negligible. I have never met one. I remember once, when I had ac-

quired terrific volubility in colloquial French, and could teach French slang to Frenchmen, and fancied myself enormously, a Frenchman saying to me: "Whatever you do, don't lose your English accent. It is adorable." A blow! To this day I rarely read a page of French without coming across a phrase that I do not comprehend, nor see a play without missing phrases. So much for speaking and understanding French.

It is pertinent to compare the experiences of Mr. Bennett with those of a very ordinarily endowed individual who learns Esperanto. In the first place it is necessary to remember that he cannot live amongst people always speaking the language. He will master the grammar and syntax in from three to nine months; at the end of nine months he will have a vocabulary sufficient for all purposes of everyday life, for travel and reading. At the end of six months he will speak the language haltingly, but well enough to make his needs understood everywhere. Fluency in conversation will take him from one to two years, according to the flexibility of his tongue and opportunities for practice. After a year's study, which should include a good deal of reading, he should never meet a phrase, except in difficult verse, which he does not immediately comprehend. Compare this with the study of French (or, for the foreigner, English, which as regards pronunciation and idiom is probably somewhat more difficult than French), and the folly of pressing the claims of a national language as the international medium will be obvious.

As with her Shakespeares and Beethovens, Nature is not prodigal with her super-poliglots. Only here and there in a century are ambulating lexicons such as Schleyer and Mezzofanti sent

to astonish their generations.

Lenin, while in Siberia, translated a book from English into Russian; but on arriving in London was depressed to realise that the swirl of spoken English that assailed his ears conveyed nothing to him. Professor T. Cart, of the Paris Sorbonne, an English scholar, gave similar testimony after his visit to the Esperanto Congress in Cambridge in 1907. Carlyle, although he had to give years to reading French documents and newspapers for his "French Revolution," left Louis Blanc none the wiser for his vobule discharge of fractured French, delivered in the accent of Craigenputtock.

Surely these instances, taken with the above frank testimony of one of England's front-rank men of letters, should inspire the unconvinced with the judgement rightly to appraise the empty assertion of superficial thinkers that a national language could serve as a bond of understanding among the world's peoples.—(Ed., "S.K.")

BENGALAJ Fabeloj.

Jen ankoraŭ dua libreto enmondigita de rimarkinda disĉiplo de instruisto Ĉe, Lakshmiwar Sinha, juna hindo nun vojaĝanta Svedujon. Dediĉita al "la avino", amata fabelisto de l' infantoj, la 39-paĝa verketo konsistas el tri mallongaj rakontoj. Kvankam nia hinda apostolo de Esperanto tute ne pretendas uzi plumon de l' kreanta majstro, sed li eldiras simple, korekte, per frazeita lingvaĵo tion, kion eterne amas la etularo. Taŭga leglibro por nelonge komencintaj. Rimarku tamen: 11, atento (tento); 25, neĝusta uzo de "promen'" (marŝ); 28, demandis (al si); 30, barbiri (la ungojn!); murmuris por si mem (kp.: "parolis antaŭ min", En Okc. Nenio Nova). Prezo unu ŝil. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1.—(Robo).

THE "BES ADRESARO."

The modest aim of those publishing the above booklet is "to collect the names and addresses of all Esperantists." Although they have yet a long way to go before they can congratulate themselves on having enrolled even the 126,500 organised users of the language, whose existence was with certitude ascertained by Dr. Dietterle, the BES address-book, with its 1120 registrations from over 40 countries, is justified in its claim to usefulness. It has proved to be for many an excellent supplement to the UEA year-book. Price 1/- from BES Adresaro, Bohema Esperanto Servo, Potštejn, Czechoslovakia.

POR LA INFANOJ.

Neatendita Vizito.

Estis proksime al Maidenwell (mejd-nuel), en la kvinslanda sovaĝejo antaŭ multe da jaroj, kiam familio de kolonianoj ekokupis krudan ŝtipkabanon per arbŝelo tegmentitan. Ĉio estis laŭ tia pionira stato, kia ordinare karakterizas tre novan enloĝigon, kiam oni estas devigata prokrasti kaj improvizi ĉiamaniere.

Estis nur unu-du semajnojn post alveno de tiuj gesinjoroj Hopeful (esp. Esperplenaj), kiam ilia nevino, agrabla junulino deknauĵara, venis viziti ilin, per la ĉefa vojo al Blackbutt (elp.: blakbot) kaj poste per laciga kaleŝveturo tra terure malebena regiono, sur mallarĝa apenaŭ laŭsekvebla vojeto.

Tiom da ektimigaj surprizoj la knabino spertis dumvoje, ke ŝi, profitante okazon de kelktempa foresto de siaj parencoj en la arbaro la sekvantan matenon sin sidigis sur la terplankon de la kabano, intencante skribe rakonti siajn aventurojn. Ŝi starigis antaŭ si tablon aŭ seĝon, kaj tiel sidis, kun pordo plene malferma. Pardonu! efektive pordo ja ne ekzistis, ankoraŭ la dometanoj tian ne konstruis.

Nu, la ĉarma fraŭlino ĵus skribis la vortojn: Unu fojon, kiam la kaleŝaĉo ĉirkaŭiris abruptan angulon, mi vidis eke... jen iguano longa je du metroj enkuriĝis kaj la granda, skvamkovrita, inkubiga reptilio glitiris rekte trans ŝiajn genuojn, disĵetante la skribilaron kaj renversigante la fraŭlinon malgraŭ ĉi ties ekkriego.

Kiam la onklino eniris la kabanon duonminuton poste, ŝi trovis la nevinojn sternita en kvazaŭmorta sveno, dum okulvideble embarasita iguano rigardis ŝin kiel se ĝi bedaŭras sian malpovon apliki provizoran kuracon.

La Stelo, Kiu Ne Volis Trembrili.

Ĉu vi iam elrigardis en la grandan stelplenan ĉielon en la nokto, kaj vidis la steleton, kiu ne trembrilas?

Kaj ĉu vi scias, kial li ne povas trembrili? Li mem estas kulpa pri tio, sed tio nur pli malĝojigas la aferon, ĉu ne?

Kompreneble, vi scias, ke kiam la steloj trembrilas, tio efektive signifas, ke ili dancas.

La steloj dormas en la taghoroj, sed tuj kiam mallumiĝas ili ekeliras unuope kaj komencas danci, kaj ju pli mallume fariĝas, des pli gaje ili dancas. Poste la luno, kiu estas la reĝino de ĉiuj steloj, aperas kaj malrapide iras trans la tutan ĉielon, observante zorge, por certigi sin, ke ĉiuj steletoj dancas konvene.

Sed iam estis unu steleto, kiu tute ne volis danci—kompreneble, tiu estis knabeto-stelo, ĉar knabinetoj-steloj ĉiuj amas danci, same kiel amas danci teraj knabinetoj—kaj kiam en unu nokto la luno demandis al li, kial li ne dancas, li nur klinis la kapon, dirante, “Ĉar tion mi ne volas fari.”

Nu, kompreneble, ke la luno tre koleriĝis, ĉar tio ne estas konvena maniero respondi al ĝentila demando de iu, tial ŝi diris, “Oni devas vin puni, kaj la puno estas, ke neniam plu vi havos kapablon danci.”

Kaj tiu steleto jam nun tute maljuniĝis kaj ofte sopiras danci kune kun ĉiuj ceteraj steloj, sed tion li ne povas fari, tial li nur sidas malgaje rigardante la feliĉajn stelojn trembrilantajn —mi volas diri dancantajn—ĉirkaŭ li.

Ĉu vi iam vidis lin? Li estas konstante tie; dum vi enlitiĝas hodiaŭnokte serĉu lin, elrigardante el via fenestro, kaj mi estas certa, ke vi tre kortuŝiĝos pro la kompatinda steleto, kiu trembrili ne povas.

—Trad. el la angla M. Purnell.

“THE NEWSPAPER OF TO-MORROW.”

In this book Mr. Harold Herd forecasts great developments: “The Press will have an opportunity of satisfying the needs of millions of people eager for culture—there may be scope for a daily world newspaper, published in the morning in London, reaching 220,000,000 English-speaking people in the evening, and with an Esperanto edition for other languages.—The Printers’ Register, March 6th.

The World Message of the Children of Wales will be broadcast this year for the ninth time on 18th May. The official text is printed among other languages in Esperanto. Those interested should communicate with the Rev. M. Davies, 10 Museum Place, Cardiff.

ESPERANTO IN TURKEY.

A group has been founded at Soke, a town near Smyrna, and from several points in Anatolia comes news of isolated Esperantist activities, writes a correspondent in Istanbul. There are Zamenhofans in Ardahan and Childir, in the Kars vilayet, near the Russian border. The movement, however, is hampered by lack of textbooks and reading matter in the new Turkish script. It is hoped that the Esperanto “key” now being prepared by the local group will soon be ready to hand over to the International Central Committee for printing.

LA PACA MONDO DE VIRINOJ.

Liu Jen-Hon. Trad. Iĉio Sun. 22pp., prezo ne montrita. Ĉe Feminisma Mondpaca Asocio, 71 Rue Marcel Tillet, Shanghai. Interesa kaj originala proponaro, sed lingvaĵo neglata kaj kelkloke nekorekta. Konsilinde, ke oni verku kun pli da zorgo.

TRANSLATION CIRCLE.

Owing to an error on the part of the Redakcio no translation from Mr. G. Gordon, F.B.E.A., appears in this issue. Translation No. 8 will, however, be printed without fail in next month’s “Suda.” We ask the kind pardon and patience of those concerned.

ESPERANTO NOTES TO APPEAR IN CHRISTCHURCH “STAR.”

A column of Esperanto notes, of interest to students of the auxiliary language, is being contributed to the “Star” monthly by Mr. N. M. Bell, M.A., D.B.E.A., who is tutor of the recently formed W.E.A. Esperanto Class.

The articles appear on the first Tuesday of each month.

CORRECTION.

The late Mr. Buchanan bequeathed £100, not £1000, to the B.E.A. The other figure (£4000) is, however, quite correct. We regret the error, which, we assure readers, was not ours.

INDIGENAJ VIVMANIERO KAJ MOROJ.

* Alparolante la porpacan societon s-ino McKenzie, ĝis lastatempe servinta en la presbiteriana misiejo ĉe Aurukun, norda Kvinslando, donis vivsimilajn vortbildojn kaj nudvortan prezenton de la indiĝena vidpunkto. Ŝi diris, ke sur malvasta peco da marbordo, longa 120 mejlojn, regione de la misiejo, vivadas ok triboj, el kiuj ĉiu posedas propran ĉasterejon.

Kvankam nature nomada, ili vagadas nur inter limoj de la triba landparto, de kiu ili aparte tenas en respekto sian sanktan toteman grundon.

La veno de blankuloj kun siaj brutaroj sur multajn nigrulajn ĉasterejojn ne nur senigis la indiĝenojn de ilia porviva rimedo, sed ankaŭ profanis sanktajn grundojn. La homnatura kaj neevitebla sekvo de tio estis, ke la nigruloj lancadis brutojn apartenantajn al blankuloj, kaj el tio sekvis longa malpacado. Tamen multe da indiĝertoj servis kiel laboristoj ĉe brutbienoj, kaj nuntempe, pro plifeliĉa interrilato, ili ĝuas bonegan protekton sub la gemastroj de tiuj bienoj, ĉe kiuj ili laboras.

Multaj indiĝenaj moroj, malgraŭ ilia ŝajna strangeco, efektive estas saĝe elpensintaj kaj sanefikaj. La indiĝeno havas malordinare sagacajn, komplikajn kaj strangan edziĝ-sistemon, fundamentitan sur ekonomia bazo, laŭ kiu, baldaŭ post ĉiu nasko, oni aranĝas inter samtribanoj pri tio, kiu devas esti estonta edzo aŭ edzino de la naskiĝinto. La periodo, dum kiu ĵus naskinta virino sidas aparte, rememorigas pri la antikva hebrea moro.

Indiĝenaj infanoj facile fariĝas lertaj sovaĝeĵistoj kaj rapide lernas diversajn indiĝenajn dialektojn, krom la angla lingvo. La alparolanto, kvankam pridubante ĉiaman veremon de la indiĝenoj, diris, ke ili tre volas respondi demandojn laŭ maniero dezirata de demandinto, kaj tio tentas ilin mensogeti. Plue ili malŝatas ies troan scirolemon, tial ili emas malverdiri por eligi el embarasa trodemandado.

UNIFORMITY OF SPOKEN ESPERANTO.

Radio station Lyon-la-Doua (France) recently arranged for five Esperantists of different nationalities to broadcast each a verse of an Esperanto poem by Zamenhof, and listeners were invited to divine their land of origin. It is not astonishing that the sharpest-eared succeeded in naming only two, for the simple sounds of Esp-o are uniformly taught over the globe, and undue influences of national speech peculiarities guarded against.

In spite of such evidence, we still meet those who claim that the peoples speak Esperanto each in its own way. It goes without saying that more often than not such objectors have never heard Esperanto spoken, and what is more do not wish to. They are cursed with the pitiable mentality of the willingly deaf, the "stoppers of ears" typified for all time by the Hebrew prophet.

—Trans. "La Movado."

HIRUNDLIBRO.

El la germana de Ernst Toller, trad. Helene Wolff.

Vere libreto dediĉita de bestadoranto al la hirundo. Persekutata suferige de la samkreituloj, la verkanto sin turnas por medito-konsolo al la bestaro, kiu samkiel li sentadas la kruelan pezprenon de la homa mano. Sur Pĝ 34/35 ni legas tre simpatian alparolon al la Bestoj. — Li, "renegato de l' homaro," volas gvidi ilin en fantazia revolucio kontraŭ iliaj homaj turmentantoj. Verkita de viro enkarcerigita pro

politiko, la libro en senrimaj versoj pensigas la poeziamanton pri la kaosa stilo de la usona poeto Walt Whitman. Ŝajnas ke nepre nur tiuj povantaj taksi meriton de modernforma psika poezio ŝatos la ĉi-libron; ni diras tion pro ĝia sendube riĉepensa sed malfacile komprenata esprimi-stilo. Tamen simplaj linioj karesas nian senton de l' belo: En la nesto

Enligitige en blankaj lanugaj plumoj
Kuas.

Kvin brunpunktitaj ovoj.

Kvin festaj temploj de ĝermanta vivo.

Malridante oni rimarkas kelkajn vortojn por multaj tute strangajn, sen ia piednoto klariga. "gelinta rigido" (It. gelare); "kvadro" (It. quadrello?); transo; firsto (?); gapanto, elanĉanta, kranki, dompti, ĝangalo (ĵangalo); drola (F. drole?); devota. Kio signifas "antaŭenkrablas unu ido"? Rimarku "duoble kaptito," "etfratineto," kaj la pensnuancon de "best-esteco" kompare kun "besteco."

Kortuŝa prozaĵo pri homa kruelo sur p. 60 kaj bonstila skizo de hirunda amo al ido, 63. Arte presita la libro kartonita kostas 2ŝ. 6p. per AEA.

(ROBO).

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That one or another of original Esperanto works of Julio Baghy, the Hungarian stylist, have been translated into thirteen languages.

That the Annual Conference of Woman Teachers (G. Britain) passed a strong resolution favoring Esperanto as a second language for all schools.

That the H.M.V. record of Hungarian folk-songs in Esperanto, accompanied by orchestra (Cat. no. A.M. 2152.), "En la Drinkejo," can be obtained from B.E.A. for 5/-, plus 1/- postage.

That the Russian Govt. has published a calendar for 1930 in six languages, one of which is Esperanto. The number was 1,500,000.

That there is a Chair of Esperanto in the commercial faculty at the Zagreb (Jugo-Slavia) University.

That the Swedish Govt. unanimously voted 2900 krone (about £168), as it did last year, for Esperanto courses organised by the teachers' federations.

That La Sennacia Asocio Tutmonda in its 235-page yearbook announces that it has now 6329 members.

That the Soviet Esp. Union, from July to December last year, sold £1500 worth of Esp. books.

That "Charlie's Aunt" will be performed in Esperanto at the Oxford Congress.

That the first Esperanto "talkie" (Metro-Goldwyn Mayer) has been presented at the "Coliseum," in Barcelona. It consists of a 15-minute conversation between an American and a Belgian lady. The pronunciation is excellent. It has also been shown at Birmingham (Eng.).

LA UNUA ESPERANTA TUT-MONDA BRODKASTO?

S-ro C. Sharpe, en Merredin, Okc. Aŭstralio, skribas, ke laŭ lia kredo la irlanda radjejo 2RN, Dublino, la unua disaŭdigis tut-esperantan paroladon al la mondo. S-ro R. Mortished ĝin parolis, kaj la ĉi-landa samcelano aŭdis la tutan klarege.

SENDU "S.K." ALILANDEN!

Precipe al la korespondanta Sudkrucano ni adresas jenon, kun espero, ke, akceptinte la sugestion, li samtempe faru por si faciligon de laboro kaj donu bezonatan subtenon al nia gazeto. Jam du-tri homoj sendas al alilandaj plumamikoj ekzempleron de S.K. de ili ekstre abonatan. Ĉu ankaŭ vi ne tiel faru, per unu bato atingante du celojn?

"NEDERLANDA PROTESTANTO"

La 22an de Marto okazis en Amersfoort ĝenerala kunveno de Protestantaj Kristanoj, por fondi nederlandan unuiĝon, kiu celas propagandi kaj disvastigi Esperanton, speciale inter la samreligiaj en Nederlando kaj ekster ĝi, kaj utiligi la internacian lingvon por ĉiuj kristanaj celoj.

La Unuiĝo estas bazita sur la konfeso, ke Jesuo Kristo estas la sola Savinto de la mondo. Pli ol 100 personoj jam aniĝis.

La entuziasmo kun kiu la Unuiĝo estas fondita, montras, ke tio ĉi estas nekre oportuna kaj eĉ bezona.

Ĉio estas granda gajno por la Esp. movado entute, kaj bela sukceso aparte por la Kristanoj.

Samreligiaj, kiuj simpatias kun ĉi tiu Unuiĝo, estas petataj, sciigi sian adreson al: la Prezidanto: H. C. van Leeuwen, Lernejestro, WIJHE, Holland: aŭ al la Sekretario: L. Woudenberg, Hildegondestr, 25 Bussum, Holland.

ESPERANTO EN LA NOVA RUSUJO.

En sia ĵus eldonita libro "Russia Today and Yesterday" (Rusujo hodiaŭ kaj hieraŭ) n.185/6. d-ro E. J. Dillon, aŭtoro de "Rusaj Karakteroj," "La

Eklipso de Rusujo"; iama profesoro de kompara filologio en la universitato de Ĥarkov, kaj redaktoro de "Odesskia Novosti"; privata konsilisto al grafo Witte 1903-14; rusa korespondanto de "Daily Telegraph" (Londono) 1889-1914, skribis jene:

"Longaj leteroj, bone verkitaj ruslingve, estis ricevitaj en Moskvon el japanaj instruistoj, literaturistoj, ĵurnalistoj kaj studentoj. Sed ne ĉiuj estis skribitaj en la lingvo de Puŝkin kaj Dostojevskv. El ili multajn oni verkis en iu artefarita lingvo, kiu ĝis la revolucio estis uzita pleje de homoj kolektantaj poŝmarkojn, poŝkartojn kaj monerojn. Nun, parte pro penado de s-ino Kameneva kaj ŝiaj kunlaborantoj, tiu lingvo jam tre vaste disuziĝis tra la mondo, kiel facila interkomunikilo inter si por tiuj proletarioj apartigitaj de maroj kaj montaroj. Hodiaŭ Rusujo povas fieri anonci, ke ĝi havas 16,000 de enregistritaj Esperanto-uzantoj. Oni diras, ke multaj hinoj kaj koreanoj legas Esperante presitajn verkojn de Lenin, Tolstoj kaj Turĝenev. Pritraktante Esperanton en "La Nord-Amerika Revuo" antaŭ ĉ. 25 jaroj, mi antaŭdiris, ke por certaj nomitaj celoj la neestetika interkomunikilo inventita de Zamenhof konkeros la mondon. Multaj legantoj sentos miron, sciigante, ke studo de Esperanto okupas kvaran rangon en tiuj sovetaĵ lernejoj, kiuj instruas nerusajn lingvojn; la unuan okupas la angla, la duan la germana, kaj la trian la franca. En la fabrikejoj laboras rondo, kiuj jam preskaŭ du jarojn korespondas kun alilandaj fabrikejaj laboristoj per Esperanto. La Smolensk-a junkomunista rondo daŭre interŝanĝas pere de tiu lingvo komunikojn kun ekstrem-orientaj komunistoj. En multaj eksterurbegaj ĵurnaloj aperadas Esperanto-lingvaj leteroj al ili senditaj de soldatoj, militmaristoj kaj laboristoj el diversaj partoj de Eŭropo. Iu "pioniro," ekzemple en Odeso, korespondante kun infanoj alilandaj, ricevas ne nur el Eŭropo, sed ankaŭ el Ameriko, Japanujo kaj Ĥinujo, leterojn en Esperanto, kiuj donas elĉerpajojn el tiulandaj poemoj kaj revoluciaj kantoj. Laboristoj en sovetaĵ fabrikejoj iam ekspedis al skandinavaj landoj siajn "murgazetojn" en Esperanto, kaj linioj el tio fari profundan impreson sur la alilandajn laboristojn, kiuj respondis per laŭdoj, gratulante la rusojn pro ties progreso, kaj certigante, ke ili malsos laŭtakte kun siaj sovetaĵ kamaradoj. Precipe laboristoj kaj membroj de la Ruĝa Armeo fervoras posedi Esperanton, kaj por esti ĉiam flue parolpretaj,

ili en Esperanto faris diskutojn ĉe kelkaj lastatempaj kongresoj. Kiel interkomprenigilo, Esperanto faras tiom da progreso, ke jam oni devas taksrigardi ĝin, kiel unu el la plej gravaj elementoj en la evoluo de la nova Rusujo."

ESPERANTO "FILMETO" IN AUSTRALIA.

We have learned that the film has been sent to 16 countries, among them Australia. If more Esp. films are to be made it is essential that every Esp-ist see this presentation, and write expressing approbation to the Paramount—Famous Lasky Corp., Times Square, N. York—in Esperanto! List of theatres and times of showing can be had from head-offices of "Paramount" in the different countries. Clubs are asked to advertise the film as widely as possible.

SENPAĜAJ TAGMANĜOJ POR LERNEJANOJ?

La konferenco de la Aŭstralia Laborista Partio postulas kelkajn gravajn ŝanĝojn je la edukplano de ŝtato Nov-Sud-Kimrujo. Inter aliaj estas jenaj: Senpaga lerneja materialo (porinfanaj skribilaro, skribkajeroj ktp.), geknaboj vizitadu lernejon ĝis la deksesa jaro, pli da stipendioj, krompagado al instruistoj studentaj kariere, revizio de la lernobjektaro kun celo forigi imperialisman tendencon, kaj enkonduko de Esperanto kiel deviga.

Ni sentas plezuron legante pri tiu entuziasmo por Esperanto ĉe la laboristaj gvidantoj, sed ĉu vere sufiĉe da instruistoj troviĝus en okazo se oni enkondukis Esp-on devige en la lernejaron? Supozeble, ke la instruistaro devus submetiĝi je intensa klerigado pri Esperanto. Ni ŝatus leterojn de tiuj pedagogoj havantaj intereson pri ĉi tiu demando.

GRATULON

al s-ino Marion Purnell, kiu jam atingas la okdekan jaron de sia aĝo, kaj ankoraŭ radias fervoron por la objekto de ŝia multjara amlaboro.

F-INO SINNOTTE EN JAPANUJO.

S-ro K. Takahaŝi, Sizuoka, ĵus ricevigis ĉe nin la jenan interesan informon:—"F-ino Sinnotte, mia malnova korespondantino, venis al nia lando. En Kioto kaj Tokio ŝi estis entuziasme akceptita de gesam-oj. Tie ĉi en nia urbo la estro de la urba biblioteko tre volis bonvenigi ŝin kaj peti de ŝi publikan paroladon. Mi detale skribis al ŝi pri la plano kaj petis ŝian konsenton, sed bedaŭrinde ŝi, tro humile, rifuzis, dirante, ke ŝi estas tute ordinara homo kaj ne meritas esti paroladisto antaŭ la publiko, dum mia deziro estis, ke ŝi nur rakontu kvazaŭ ĉe tekunveno diversajn pri Aŭstralio. Ŝi jam nun estas en ŝipo sur Pacifika marego."

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas jenajn abonojn, samtempe instigante al tiuj, kiuj ankoraŭ restas nepagantaj, ke ili bonvole faru la negravan klopodaĵon, iri al la poŝt-kesto por sensuldiĝi. Antaŭdankon! J. Hills, 9/-, nov., '31; pastro Downey, 21/-, marto, '34; H. Facer, 5/-, majo, '31; f-ino de Novak, 5/-, aprilo, '31; S. Bishop, 4/6, julio, '31; per f-ino Blyth, 5/-; f-ino V. Newnham, 4/6, aprilo, '31; f-ino F. Lewis, 5/-, majo, '31.

KRONIKO.

Denove kun peza koro la redaktoro, ne havante enmane ian kronikaĵon de tri ŝtatoj, iras en presejon por avizi, ke ekaperigu la Suda Krucoj por junio. Estas amare sentata ĉi tiu manko de koncerna kunlaborado, kio daŭre nepovigas nian gazeton kontentige sian rolon plenumi—disiradi kiel vere ĉiufanka informilo Esp-a por la tuta Aŭstralazio.

Melbourne, Vict.—Per plua rakonto ni sekvu s-ron R. Hudson de kiam li lasis la belan distrikton de Kashmir, kiu estas 6000 futoj super la maro. Li revenis al Rahal Pindi kaj de tie veturis ĝis Peshawar, kie estas granda bazaro. La urbo estas ĉirkaŭita de montoj, kaj

SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN!

PERCY HOLMES
Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.

belaj floroj kaj fruktoj kreskas abunde. Inter ĉi tiu montaro en neŭtrala regiono troviĝas la fama "Kyber Pass." Poste s-ro Hudson vojaĝis suden al Cawnpore kaj Lucknow, kie okazis la granda ribelo en 1857. Moskeoj, tombejoj, kaj palacoj estas vidindaj en la urbo. La sankta urbo Benares estis poste vizitata, apud la rivero Ganges, en kiu ĉiu Hindo devas ĉiutage sin bani antaŭ ol manĝi. En Benares estas 400 temploj, kaj kupolo farita el oro beligas la "Oran Templon," kie deĵoras 300 pastroj. Du rimarkindaj temploj estas "Templo de la Bovinoj" kaj "Simia Templo," kie troviĝas multe da simioj, kiuj netime manĝas el la manoj de la vizitantoj. Multaj el la stratoj estas mallarĝaj, kaj en kelkaj la kvinse-etaĝaj konstruaĵoj konverĝas je la supro kaj sekve la stratoj estas tre mallumaj. La interna beleco de la palacoj troviĝas en la muraj ornamaĵoj, kaj vastaj salonoj kaj vestibloj, ĉar la cambrejoj mem estas nemeblitaj krom per tapiŝoj kaj kusenoj. La vizito de s-ro Hudson estis dum la pluvsezono kaj li transpasis la Ganĝon sur ponto de boatoj, ĉar pro la pluvo la rivero estis larĝa je $\frac{1}{2}$ mejlo.—Calcutta—La "Victoria Memorial" el blanka marmoro estas la plej bela konstruaĵo en Hindujo, kaj staras en la mezo de bela gardeno. La "Marmora Palaco" estas rezultato de kurioza sorto de homo, kiu aĉetis terpecon, kaj, fosinte ĝin, li trovis trezoron. El la valora "trovitaĵo" li donis trionon al la registaro, tenis trionon por si mem, kaj per la alia triono li konstruis palacon, en kiu li montras belajn artaĵojn. Lasinte Calcutta s-ro Hudson iris tra Saliguri ĝis Darjeeling, 800 futoj super la maro. En la ĉirkaŭaĵoj de la urbo troviĝas multe da tegardenoj, kaj la stratoj estas tiel mallarĝaj ke oni povas veturi nur en ricksha.

Dum la monato, juna Esperantisto, s-ro Thos. King, el Belfast, Irlando, venis al Melbourne, kaj vizitis la samideanojn ĉe ambaŭ kluboj.

Auckland, Nov-Zelando—"Esperanto kaj Paco," jen temo, kiun s-ro C. Adcock, prez. de NZEA, priparolis antaŭ lokaj paclaborantoj en kunveno la 6an

de majo. Ili atentoplene lin aŭskultadis, kaj postfine dankon esprimis. S-ro Adcock saĝe semis, direktante la okulojn de tiuj idealistoj al nia lingvo pacocela.

S-roj Russell kaj Wheeler ankoraŭ brodkastas el 1YA. La lekcioj estigas multe da intereso.

En aprilo nin vizitetis s-roj King, hon. sek. de NZEA, kaj s-ro B. Klariĉich, el Wairoa.

Masterton.—Grupanoj pasigis agrablajn vesperojn la 15an de aprilo, kiam okazis speciale aranĝita programo. Ĉirkaŭ 50 personoj partoprenis. S-ro parlamentano G. Sykes, kiu prezidis, atentotene paroladis pri la pasinta jar-esdeko. Deklamojn kontribuis f-inoj Bates kaj Drew, s-ino L. Payne, s-ro Johns kaj V. Engstrom. S-ro J. Johns, grupprez., ludis sakfajlon, kaj f-ino Brewster lin akompanis per danco. S-ino Pavlinovich paroladete priatestis, kiom utilis al ŝi Esp-o dum vojaĝo de Ĉeĥoslovakio al Nov-Zelando.

Pasintmonate la grupo enskribis du novajn anojn—kuraĝiga plupaŝo en tiu ĉi malgranda urbo. Malgraŭ, ke nia kampo por propaganda laboro estas nur malfacile fruktigata, ni "semas kaj semas konstante": s-ino Payne aperigas okulfrapajn elтираĵojn el "La Suda Kruc" kaj aliaj gazetoj, kaj s-ro Franks provizis al iu redaktoro detalojn pri sia praktika uzo de Esp-o koresponde kun transmara samprofesiano, kiujn la redaktoro presigis en grava kolono. La gazeto ne estas grande abonata, sed estas grave, ke ĉiu N.Z. redakcio ricevis ekzemplerojn, per tio informiganta pri Esp-a progreso.

Rangataua, N.Z.—S-ro T. Murdie, kiu antaŭnelonge interesiĝis en Esp-o nun klopodas starigi klubeton aŭ klason sialoke. Sukceson!

Christchurch, N.Z.—Je la 15a de aprilo la Christchurch Esp-Societo enkorpiĝis kun klaso sub aŭspicioj de WEA (Laborista Eduk-Asocio) kaj jam de tiam estas nomata "La WEA Esperanto-Kursoj." Tio estas por rajti profiti la postmortan donacon de 500 monfuntoj al Esp. Klaso en nia urbo La kursoj havas sek-iinon, kaj s-ro N. Bell, M.A., gvidas. En la inaŭguracia

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE,

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco. Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

MELBOURNE.

vespero, kiam ĉeestis dudeko da geanoj, s-ro Manning, sek-io de WEA., priparolis la WEA-on, kiel edukperilon por socie-ĉiurangaj personoj, kaj volis sukceson al la kursanoj. Post nelonga parolo pri Esp-o kiel pormonda beno, s-ro Bell tuj komencis instrui la gramatikan fundamenton kaj per nigratabulo provizis lecionon.

La infanklaso—La Stela Rondo—ree funkcias. Ĉiu aneto povas deklami la unuan strofon de La Espero. Rondanoj arde laboras, celante interŝanĝi skribajojn ktp. alilande.

En marto s-ro Bell vizitis radiejon 3YA kaj brodkastis. Li samfaris la 5an de majo. La "Radio Record" publikigis lian martan lecion!

Sidnejo, N.S.K.—Laŭ sesmonata programo de la S.E.S., la jenaj samideistoj informodone parolis en aprilo: S-ro H. Matashin pri Milito kaj ĝiaj sekvoj, kaj s-ro H. Davies pri Aŭstralio.

Ekzameno por la diplomo de la B.E.A. okazis je la 17a de aprilo, kaj je la 24a la ĉiumonata festvespero.

Letero de s-ro Hart sciigas, ke li kaj la edzino ĝuas la vojaĝon al Londono, kaj flugigis saluton al la ĉilanda samcelanaro.

Je la lasta aferkunveno de SES la 1an de majo, oni diskutis eblecon okazigi E. kongreson en Sidnejo pasklibertempe 1931. Pludetala informo baldaŭ.

Brisbano (Kvinslando).—La societa agado daŭras sen rimarkindaj sukcesoj; sed ĉefa afero estas tio, ke ĝi daŭras.

Dimanĉon (18 majo) la societo kampfestis en Samford, en pentrinda loko apud rivero. Tamen, pro kunesto de diversaj neesperantistoj, oni ne multe parolis esperante.

Pro konversacia ekzerco, la sekretario aranĝis imitan marveturon. La ŝipestro kaj sipsekretario unue dungis la ŝipanojn, farante al ili diversajn demandojn pri ilia sperto je navigado, hejtado, ktp., kaj poste eldonis biletojn al la pasaĝeroj, kiuj devis klarigi la celon de sia vojaĝado, la specon de kajuto kaj cetero. Tiu ĉi ekzercado montrigis tre utila al la komencantoj, kiuj eklernis diversajn novajn vortojn. En la proksima kunveno de la societo oni daŭrigos la "marveturon"; la pasaĝeroj eble aranĝos la kutiman surŝipan koncerton, kaj la ŝipo poste trafos rifon kaj pereos.

Per la alveno de sinjoro F. T. Simon, eks-prezidanto de la Sydney' a Esperanto-societo, kiu de nun loĝos en nia urbo, la Brisbana movado forte gajnos.

La konataj entuziasmo kaj energio de sinjoro Simon multe akcelos la movadon en ĉi tiu urbo.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masteron (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.